# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 08/07/2021 Kvincenttridekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **229,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **203,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **99,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde novembro 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 42 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:




1). En "Dum la dek minutoj, dum kiuj li manĝis, la tuta torto malaperis":

A). Kio estas la ĉeffrazo kaj kio estas la subfrazo?

B), Unu vorto en la subfrazo reprezentas, signifas, ripetas alian vorton en la ĉeffrazo. La vorto en la subfrazo nomiĝas "rilata pronomo". La vorto en la ĉeffrazo nomiĝas la "antecedento". En la ĉisupra kombinita frazo, kio estas la antecedento kaj kio estas la rilata pronomo?

C). Kiu estas la gramatika objekto en la ĉeffrazo kaj kiu en la subfrazo?

2). En la frazo "Li ĉiam estis fidela amiko", kiuj vortoj estas gramatika objekto kaj kiuj vortoj estas adjektoj?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 538. *Marcel Leereveld.*


★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



_ La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Bakterioj el bovinaj stomakoj disigas plastaĵojn

5a Julio 2021

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

*Roger Springer*

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

## Interesa reta serĉado



Dum la jarkunveno de la grupo Esperanto en 3ZZZ, Karlo, kies voĉon vi foje aŭdas en la radioprogramo, plendis ke oni ne sufiĉe ofte disaŭdigas la kanton “ Donu al mi vian manon” , sed li ne povis diri kiu grupo, kiu kantisto kantas ĝin. Rehejmiĝinte , mi petis GOOGLE solvis la problemon .

Ĝi proponis al mi unu el la videoj faritaj de Evildea “ Donu al mi vian monon” . Ĝi ne estas la serĉata kanto, sed mi havis kelkajn minutojn da amuzo kun la petolema Evildea. Kvankam mi daŭre ne scias kiel trovi la petitan kanton , mi ne bedaŭras la eraran respondon de Google. Provu la jutubaĵojn de Evildea kaj vi komprenos.



*Franciska Toubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# UEA INVITAS VIN PARTOPRENI EN LA KAMPANJO POR KONVINKI UNESKON DEKLARI LA "INTERNACIAN TAGON DE ESPERANTO"

Ĉiujare Unesko festas la Tagojn de la lingvoj Angla, Ĉina, Portugala, Rusa, Romaa… Kiam ĝi festos la naskiĝtagon de Esperanto, kiu kiel internacia lingvo multe kontribuis al la mondaj kulturo, paco kaj komunikiĝo de la popoloj, deklarita kiel nacia nemateria kultura heredaĵo de Pollando kaj Kroatio, kaj uzata en *Unesko-Kuriero* kaj aliaj Unesko-eldonaĵoj? Fakte la vera naskiĝdato de Esperanto, t.e. la 26-a de julio, estas festata de nia komunumo jam 134 jarojn. Mankas tamen oficiala agnosko fare de Unesko. Tio estas delonga revo de multaj esperantistoj tra la mondo. La deklaro kredeble utilos al la disvastigo de kaj informado pri Esperanto. Ĝuste pro tio UEA intencas lanĉi kampanjon por konvinki Uneskon deklari la 26-an de julio kiel la "Internacian Tagon de Esperanto".

Por sukcesigi la kampanjon ni devas unue konvinki Membrajn Ŝtatojn (kies instancoj kutime estas Unesko-komisionoj/oficejoj en la landoj) iniciati la proponon al Unesko; persvadi kiel eble plej multajn Membrajn Ŝtatojn esprimi sian apogon en la voĉdonado. Dum la enketa kaj prepara tempo, en kiu UEA rekte rilatis kun asocioj kaj aktivuloj, 26 landaj asocioj aŭ aktivuloj (en Angolo, Aŭstralio, Benino, Brazilo, Bulgario, Burundo, Ĉinio, Danio, DR Kongo, Germanio, Irano, Hispanio, Kroatio, Litovio, Nederlando, Nepalo, Pollando, Portugalio, Rusio, Senegalo, Slovakio, Sud-Afiko, Taĝikio, Tanzanio, Venezuelo kaj Vjetnamio) anoncis sian partoprenon en la kampanjo. El ili tri asocioj jam sendis proponajn dokumentojn al la instanco kaj aliaj du asocioj jam kontaktis sian nacian Unesko-Komisionon.

Ju pli da Membraj Ŝtatoj iniciatos la proponon al Unesko, des pli multajn apogojn ni akiros ĉe tiu organizo. Tial UEA elkore invitas plejeble multajn aliajn landajn asociojn, Esperanto-organizojn kaj/aŭ individuajn aktivulojn iniciati la proponon al la Unesko-komisionoj/oficejoj de siaj propraj landoj. UEA pretigis formularan proponan leteron por landaj asocioj (nome la 1-an dokumenton), por per ĝi konvinki la naciajn Unesko-komisionojn; kaj komunan argumentan dokumenton en la franca kaj la angla (nome la 2-an dokumenton), por ke ĉiuj naciaj Unesko-komisionoj iniciatu la proponon per ĝi (ĉirkaŭ 1 400 vortoj). Oni povas peti ankaŭ hispanan kaj portugalan versiojn pretigitajn de landaj asocioj.

La taskoj de la iniciatantaj landaj asocioj estas:

- Surbaze de la 1-a dokumento liverita de UEA prepari nacilingvan dokumenton, aldonante prezenton pri la movado en sia lando kaj doni ĝin al sialanda Unesko-Komisiono;
- Laŭ la evoluo de la kontaktoj traduki, se necese, la 2-an dokumenton en la respektivajn naciajn lingvojn. Ĝi estas ekzemplo de letero de la Unesko-komisiono al la centraj instancoj de Unesko aŭ al la landaj reprezentantoj en Parizo;
- Liveri al la Unesko-Komisiono en sia lando la 1-an kaj la 2-an dokumentojn, konvinki la Komisionon iniciati la proponon al Unesko;

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

- Prepari pliajn bezonatajn dokumentojn, se tion postulos aŭ petos la Unesko-Komisiono en ilia lando;
- Post kiam la nacia Unesko-Komisiono/Oficejo sendos oficialan proponon al Unesko, provi konvinki ĝin serĉi novajn apogojn de aliaj amikecaj landoj. **Nacia Unesko-komisiono devas sendi la proponon al Unesko en julio.**
- Raporti al UEA pri la progreso en sia lando por faciligi kunordigadon de la tutmonda kampanjo.

UEA planas nomumi aktivulojn kiel komisiitojn, por ke tiuj povu rekte kontakti kaj konvinki Unesko-Komisionon en sia lando, se en iliaj landoj mankas asocioj aŭ la asocioj havas malfacilaĵojn.

Esperantistaj organizoj kaj esperantistoj, kiuj ne havas kondiĉojn konvinki la Unesko-Komisionon en sia lando povas kontribui per informado pri Esperanto en nacilingvaj kanaloj, esperantigo de Unesko-koncernaj artikoloj en Vikipedio, disvastigo kaj elŝuto de *Unesko-Kuriero*, mendo de la Unesko-libro *De ideoj al agoj - 70 jaroj de Unesko*, partopreno en la Unesko-enketo en Esperanto kaj donaco al agado de UEA ĉe Unesko.

Se vi interesiĝas, aliĝu per mesaĝo al <esperanto.tago.kampanjo@co.uea.org> por ricevi la menciitajn dokumentojn.



Kun saluto, *Katja Steele*



**3ZZZ**.... En la elsendo de la 5a de julio 2021 estas emfazita la rilato inter dieto kaj stato de la medio. Aŭdeblas ankaŭ novaĵoj pri la movado .
Okazis la jarkunveno de la grupo Esperanto kun tre malmulte da ĉeestantoj ( 5 membroj!) la 2an de julio. Se vi interesiĝas pri la radio -elsendo en Esperanto , eblas kontribui per sendado de registrita materialo je la adreso 3zzzesperanto@gmail.com . Ne hezitu ,riĉigu nian programon. Ni antaŭdankas vin.

....*Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVO DE LA KVIZETO 42**

1). A). Ĉeffrazo: "Dum la dek minutoj la tuta torto malaperis".
Subfrazo: "dum kiuj li manĝis".
B). Antecedento: "(la dek) minutoj"; rilata pronomo: "kiuj".
C). Ne estas gramatika objekto en la ĉeffrazo nek en la subfrazo.
2). Ne estas gramatika objekto en ĉi tiu frazo. Adjekto = "ĉiam".

*Marcel Leereveld.*

**AE estas kontraŭ militoj kaj subtenas la mondan loĝantaron**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



# M i a k u z a s .

**MI AKUZEGAS**

La tiaman aŭstralian ĉefministron kiu decidis militi kontraŭ la diktatureco de Husseno kaj mortigi lin sub falsa akuzo ke Husseno sekrete kreis nukleajn armilojn. Nia ĉefministro sciis, aŭ profesie devis scii, ke tiu kialo estis mensogo de la mensoganta usona ministro por internaciaj rilatoj. Konsekvence nia ĉefministro kulpas pro la mortoj de aŭstraliaj soldatoj kaj de irakaj soldatoj kaj civitanoj. Do li estas krimulo, sed oni ankoraŭ ne punis lin por la mortigoj. Kial ne? Kaj li kulpas ankaŭ, ke Saddam Hussein ne plu povis subpremi la Islaman Staton, kiu nun regas en partoj de la Mezoriento. Ankaŭ pro tio nia ĉefministro devus punati, prefereble per vivlonga enkarcerigo. Kial oni ankoraŭ ne punis lin? Ĉu kaŭzi la morton de aŭstralianoj ne estas krimo? Kaj mi akuzas min kaj vin kaj ĉiujn aŭstralianojn ke ili ne malhelpis nian ĉefministron kaŭzi mortojn kaj suferadon. Ankaŭ ni do estas kulpaj. Nun la Islama Stato regas en parto de la mezoriento, kaj ni ĉiuj helpis kaŭzi tion.



Kaj kial ni helpis nian ĉefministron krei plurajn militojn kiujn ni perdis, kiel tiun en Afganujo, kiun militon nia ĉefministro, kaj do ni, komencis fari por obei la militeman Usonon? Nia lando, kune kun Usono, nun forlasas la militon en Afganujo, kiu lando eniros en militon kun la Islama Stato, sola. Kial ni kaŭzis punindan kriman militon, anstataŭ lasi Ruslandon fari la laboron pli efike kaj sukcese? Ĉu nia ĉefministro ne kulpas fari tiun teruran militon? Ĉu li ne kulpas pro la mortigado kaj devus punati por tio? Kaj mi akuzas la aŭstralian popolon, do ankaŭ min, kaŭzi mortojn ĉar ni ne zorgis ke nia ĉefministro ne kaŭzu la mortojn? Kaj kiam nia kulpa ĉefministro estos punata por kaŭzi la mortojn? Mi atendas! Mortigi, eĉ mortiganton, estas krimo kaj punatu. Mi akuzas nin por helpi la ĉefministron. Neniu milito estas utila, escepte por la armilproduktistoj. Ĉu ili ne faras krimon vendante armilojn? Ĉu ili jam estas punataj pro tiuj krimoj? Ĉu ni, la popolo, ne devas zorgi ke krimuloj punatu? Mi do akuzas nin.

Kaj Vjetnamujo? Nia tiama ĉefministro kulpas pro suferigi la popolon kiu ricevis la usonajn venenajn gasojn kiujn Usono spruĉis sur ilin por testi ilin. Ni, kaj eĉ pli nia tiama ĉefministro, kulpas pri la mortoj kaj suferado de la vjetnama popolo, ĉar ni ne rifuzis helpi la usonan registaron esti terura kruela mortigisto meritanta usonan mortpunon. Kiam ni laboras por zorgi ke la usona registaro ricevu sian punon por siaj krimoj? Ĉu la usonanoj kaj ni ne devas publikigi tiun neceson de punado pro krimoj?

Kaj ĉu ni lasu Scot Morrison fari similajn krimojn en proksima milito? Ĉu ni kuraĝas diri al li ke kaŭzi la morton al homoj estas puninda krimo?

Marcel Leereveld.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***